NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
jesusmiguel.garcia@ehu.es

TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

SEPTEMBROO/OKTOBRO 2007 **Nro. 71 (4/07)**




Ĉu nova "ZEO"?.

E-horloĝo farita de Gorka Díez, 13-jara membro de la bilbaoa Grupo.
Ĉu iam ĝi signalos la horon de Esperanto ene de Eŭropa Unio?

LOKE ...

LOTERÍA DE NAVIDAD.



Como de costumbre, ya está disponible la tradicional lotería de Navidad del Grupo. Aquí arriba se puede ver el número que se llevará el "gordo" de este año (28.446). Cada billete, íntegramente en Esperanto, cuesta 3,00 euros, de los que 2,50 son jugados en lotería y los 0,50 restantes quedan como donativo para el Grupo. **Toda la ayuda que podamos recibir para la venta de los boletos será bien recibida**.

SOMERVOJAĜOJ.

Ĉi-jare, la membroj de nia E-Grupo montriĝis sufiĉe pigraj rilate la partoprenon en E-aranĝoj. Tiel, nur nia Prezidanto, **José Luis Bringas**, vojaĝis eksterlanden por partopreni la EEŬ-Kongreson de Maribor (Slovenio).

Ni esperu ke la venontajn jarojn ne okazos same, ĉar la du venontaj UK estos en Eŭropo, nome en **Roterdamo (2008)** kaj **Bjalistoko (2009)**. Ĉi lasta urbo alportas specialajn rememorojn al multaj geesperantistoj de Bilbao, ĉar en la naskiĝurbo de Zamenhof okazis sia unua kontakto kun fremdaj esperantistoj en la tro malproksima jaro 1981.

PAGO DE CUOTAS 2007.

Si a la izquierda de estas líneas encuentras una "X", es que aún no has pagado la cuota de socio correspondiente al presente año 2007. El importe a pagar y el número de cuenta en que la puedes hacer efectiva aparecen en la cabecera de esta circular. Esperamos tus noticias.

LEGITA IE KAJ TIE...

30/06/2007. El Correo.

Según la web Langmaker (www.langmaker.com), dedicada a los idiomas artificiales, el Quenya o idioma de los altos elfos inventado por J.R.R. Tolkien es la segunda más popular en Internet por detrás del **esperanto**. Poder despedirse de alguien en este dialecto no tiene precio: "A vanta as márë órelyar! Nai eleni siluvar antalyannar" (Hasta siempre y que las estrellas os sonrían).

26/07/2007. El Correo.

1887. Primer libro en Esperanto. Edición del primer libro de **Esperanto**, lengua creada por el doctor polaco Ludwik Lejzer Zamenhof.

31/07/2007. El Correo. M. Alcántara.

... La reŭnión de chiíes, suníes y kurdos en su equipo de fútbol ha logrado que, durante unos días, Irak sea una fiesta y que renazca la esperanza de que el deporte sea el idioma donde puedan entenderse todas las razas. Ese **esperanto** que hable todo el mundo mientras enmudecen los cañones.

Universala Kongreso 2009 en Bjalistoko.

Hodiaŭ oni decidis, dum la Universala Kongreso en Jokohamo, ke la 94a Universala Kongreso de Esperanto, kunmemoronta la 150-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, okazos en la pola urbo Bjalistoko, kie li naskiĝis la 15an Decembro 1859.

La Urbestro Prezidanto de Bjalistoko, sinjoro Tadeusz Truskolaski, vojaĝis tiucele al Jokohamo kaj faris diskurson antaŭ la kongresanaro en perfektega Esperanto, dum kiu li pledis por ke la Kongreso 2009 okazu en sia urbo, kio estis tuj varme akceptita.

(Darío Rodríguez. 10/08/2007).

Noto de la red.: Ni preskaŭ lokigis tiun-ĉi novaĵon inter la "lokaj", ĉar certe Bjalistoko estas tre speciala urbo por multaj membroj de nia E-Grupo. Ne nur pro tio ke ĝi estas la naskiĝurbo de la kreinto de la internacia lingvo, sed pro tio ke, en la jam malproksima jaro 1981, granda aro de gejunuloj veturis tien trajne por partopreni Esperantan Internacian Laborbrigadon kaj stabligi iliajn unuajn kontaktojn kun eksterlandanoj. Belaj rememoroj por multaj bilbaoaj esperantistoj. Ĉu ni partoprenos tiel amase la venontjaran Universalan Kongreson?

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO (HEF)

Renovigo de la estraro.

Oni kreis komisionon por trakti la nunajn organizajn problemojn de HEF kaj serĉi eventualajn kandidatojn por anstataŭi iujn. Pedro Hernández kunordigos tiun komisionon. Rilate tion, jen informo de la estrarkunveno datita 2007-09-17: Augusto Casquero, Carmen Suárez, Lupe Sanz kaj Pedro Garrote lasas siajn postenojn je la dispono de la Komisiono por trovi novan estraron. Pedro Garrote, kiel kasisto, anoncis ke li lasos la postenon en la estraro en januaro de 2009 kiam li fermos la kontojn de 2008. Por ne lasi leĝan vakuon, la nuna estraro daŭrigos sian laboron ĝis la Ĝenerala Kunveno kiu elektos novan estraron.

Hispana Kongreso 2008.

Ĝi okazos en **Cuenca** inter la 3-a kaj la 6-a de julio. Alejandro Pareja, Prezidanto de la LKK, atendas oficialan respondon rilate kongresejon kaj malmultekostan loĝejon. La aliĝilo estos disponebla antaŭ ol la fino de la jaro (kotizo 30 euroj, 25 por HEF-anoj).

Kolekto de "Boletín" en la reto.

Jam oni povas legi la kolekton de **"Boletín"**-oj de Hispana Esperanto-Federacio. Bedaŭrinde mankas multaj ekzempleroj, sed eble, dank'al la helpo de malnovaj HEF-anoj kiuj zorge konservis la kolekton de aperintaj bultenoj, oni povos iam kompletigi ĝin. La malnovaj numeroj devenas el la kolekto de la Gazetoteko Lanti, al kies prizorganto s-ro. Jesuo de las Heras ni esprimas nian plej koran dankon. En la cefa pago de HEF http://www.esperanto.es troveblas dekstre la ligilo al la kolekto. En la aperanta paĝo aperas menuo kun la jaroj, ekde 1949 gis 2007.

2008, Internacia jaro de la lingvoj.

Toño del Barrio, sendis al diversaj e-aktivuloj la unuajn proponojn por komenti pri la projektoj por la eventoj de venontaj du jaroj: **2008.- Internacia Jaro de Lingvoj kaj 100-jariĝo de UEA. 2009.- 150 datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.** La estraro aprobis ke HEF, kune kun "Fundación Esperanto", subskribos la projektojn. Provizore, Lupe okupiĝos pri la rilatoj de HEF kun "Fundación" (Toño).

Pri la ĉi-jara kongreso.

La 66-a HEF-Kongreso disvolviĝis en Palos de la Frontera (Huelva) kune kun la Andaluzia Kongreso; la programo disponita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estis abunda kaj alloga. HEF nur programis sian Ĝeneralan Kunvenon, kiun partoprenis 22 membroj, el kiuj, 6 reprezentataj kaj 3 estraranoj.

(Novaĵoj ĉerpitaj el "Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo. Sep/Okt 2007)

Statistikoj de UEA.

Por via informo jen komuniko pri la pasintjara membrostatistiko de UEA. Laŭlanda statistiko aperas en la aprila numero de "Esperanto" kaj estas jam legebla por tiuj ricevantoj de la revuo, kiuj registriĝis kiel uzantoj de la reta Jarlibro.

Mia rutina tasko post la farado de la statistiko estas konstati, ĉu la landaj asocioj plu plenumas la kriterion, ke ili devas havi minimume 25 membrojn. Per tio oni celas la nombron, laŭ kiu UEA ricevis pagon en formo de kotizoj de aligitaj aŭ individuaj membroj.

En 2006 tiun kriterion ne plenumis Meksika E-Federacio, kie estis 2 aligitaj kaj 22 individuaj membroj. Mi ne scias, ĉu ĉiuj 22 individuaj membroj de UEA membris en MEF, sed eĉ se tiel estus, la sumo restas sub 25. Tia asocio ne perdas aŭtomate sian statuson, sed tio povos okazi post oficiala anonco pri tio en kunsido de la Komitato, krom se la Komitato donos al ĝi tempon por reatingi la minimumon aŭ se ĝis la UK tio jam okazis rilate la kotizojn por la nuna jaro.

Informis: Osmo Buller, Ĝenerala Sekretario de UEA.

Bush se asombra de que tengan que traducirle al alemán.

Heiligendamm (Alemania). (EFE).- El presidente de EE.UU., George W. Bush, expresó su asombro porque sus palabras tuvieran que ser traducidas al alemán durante su primera comparecencia ante la prensa en la cumbre del G8 en Heiligendamm.

Durante una declaración conjunta con la canciller alemana Angela Merke, Bush ya había terminado de hablar cuando un traductor comenzó a repetir en alemán lo que él había dicho. "Todo el mundo habla inglés, ¿no?", dijo con una sonrisa. Merkel, divertida, le pidió que fuera "paciente" y le indicó que se mantuviera de pie a su derecha, en el jardín del Hotel Gran Kempinski donde almorzaron juntos. Tras terminar la traducción, Bush le preguntó a Merkel: "¿es eso lo que he dicho?" y Merkel le respondió, en inglés, "casi al 100 por ciento".

(Sendis Toño del Barrio. 6/6/2007).

Filmo uzas Esperanton.

La usona filmo "Gattaca" uzas Esperanton por anoncoj disaudigitaj per laŭtparoliloj en salonego kie okazas parto de la filmo.

Ĝi estas vendata hodiaŭ, sabate, po 5,95 euroj kun ĵurnalo "El País" (en la lasta paĝo aperas kupono).

(Darío Rodríguez. 9/6/2007).

Eŭropa komisaro pri lingvoj parolas pri "fiaskinta Esperanto".

El Comisario Europeo de Multilingüismo, Leonard Orban, expuso hoy, durante su visita a España, la intención de la Unión Europea de fomentar, a partir del año 2008, el multilingüismo entre los países miembros mediante una estrategia que vaya 'más allá de la traducción'.

Las nuevas admisiones en la UE de Bulgaria y Rumania han llevado a pasar de los 11 idiomas oficiales de hace casi cinco años a los 23 actuales. A pesar de que tan sólo el francés, el alemán y el inglés están considerados por la UE como los idiomas troncales, Orban aseguró que luchará 'por defender la igualdad entre ellos'. La presencia masiva del inglés en la mayoría de los documentos oficiales ('más del 70 por ciento en total') no preocupa al comisario de origen rumano, ya que se trata simplemente 'de un procedimiento habitual'.

Orban rechazó la posibilidad de una lengua común, similar al fracasado Esperanto, que facilitara la comunicación de una manera más sencilla. 'Estoy en contra, ya que a medida que avanzamos hacia la integración, debemos mantener la diversidad'. 'Esa es nuestra riqueza y no debemos compararnos a los Estados Unidos', afirmó.

(Toño del Barrio. 11/06/2007)

"La Mastro de l' Ringoj" en Esperanto.

T. Hirsik, la prezidanto de la E-Asocio de Estonio, iĝis la unua aĉetinto de la nova eldono de La Mastro de l' Ringoj, de J.R.R. Tolkien, premiere prezentita de la eldonejo Sezonoj la 15an de julio 2007 en la 43aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Litovio.

Aleksander Korĵenkov, kiu redaktis la novan eldonon, rakontis en la lanĉa ceremonio pri la aŭtoro, pri la legenda (kaj leg-enda) verko, kaj pri la Esperanta traduko de William Auld, kies unua eldono elĉerpiĝis baldaŭ post la unua eldono. Zorga kontrolado fare de tri provlegantoj ebligis elsarki erarojn, kiuj estis en la unua eldono. La dua eldono estis presita en Kaŭno (Litovio) kun kovriloj de Vladimiras Beresniovas kaj speciala banderolo, kiu kuntenas la tri volumojn (La Kunularo de l' Ringo, La du turegoj, La reveno de la Reĝo).

En aŭgusto la eldonejo dissendos la libron al la antaŭmendintoj kaj La Mastro de l' Ringo estos aĉetebla ĉe la libroservoj de UEA, FEL, ELNA, GEA, EAB, JEI kaj ĉe aliaj grandaj libroservoj.

Sed jam nun ses ĉapitroj el La Mastro de l' Ringoj kaj kelkaj aliaj tekstoj de/pri Tolkien estas legeblaj en la retpaĝaro de Sezonoj http://www.esperanto.org/Ondo/ en la rubriko Tolkien en Esperanto.

(Aleksander Korĵenkov 26/07/2007)

Toño del Barrio premiita.

Toño del Barrio, nia kara amiko el Madrido kaj senlaca laboremulo, estis premiita de UEA en ĝiaj belartaj konkursoj ĉi-jaraj, en la fako "eseo". Jen la rezultoj:

Unua premio: Geoffrey Sutton (Britio) pro "Pri la periodoj de la Esperanto-literaturo".
Dua premio: Paulo S. Viana (Brazilo) pro "Psiko-memhelpa literaturo: utila? senutila? malutila?";
Tria premio: Tonyo del Barrio (Hispanio) pro "La normala lingvo".

(HEF 11/08/2007).

Nova estraro de UEA elektita!

Probal DAŜGUPTO estas nova prezidanto de UEA, laŭ elekto de la Komitato en la kunsido, lunde en Jokohamo.

Aliaj estraranoj estas **Ranieri CLERICI** kaj **Claude NOURMONT**, ambaŭ vicprezidantoj, kaj nova ĝenerala sekretario estas **Barbara PIETRZAK**. Pliaj tri estraranoj estas **Loes DEMMENDAAL**, **HORI Jasuo** kaj **José Antonio VERGARA**, tiel ke la tuta nombro estos sep estraranoj.

(Raportis Ulla LUIN. 12/08/2007).

Tutpaĝa anonco pri Esperanto en "Le Figaro".

Laŭ oni informis en soc.culture.esperanto, hodiaŭ, 3an de Aŭgusto aperas en la paĝo 5a de la franca ĵurnalo "Le Figaro" tutpaĝa anonco pri Esperanto pagita de **Etsuo Miyoshi**.

(Darío Rodríguez. 03/08/2007).

La abonantoj de LF referendume elektos la esperantlingvan kandidaton al la literatura Nobel-premio

La abonantaro de revuo Literatura Foiro estos konsultita per referendumo por elekti la esperantlingvan kandidaton al la literatura Nobel-premio 2008. La referendumo okazos ĉi-aŭtune, surbaze de kvino da nomoj selektitaj fare de la membraro de Esperanta PEN-Centro, kiel okazis pasintjare.

Jen decido de la ĵus okazinta Asembleo de la Esperanta PEN, kiu ĉi-rilate rajtigis la diskonigon de la nomo de la kandidato proponita por 2007: István Nemere. La selekto de la kvino por 2008 okazos dum la baldaŭaj tagoj. Eble la lastatempa sukceso de Spomenka Štimec en la PEN-premio La Verko de la Jaro pligrandigos ŝiajn ŝancojn, ĉe la balotontoj.

(Redakcio de revuo Literatura Foiro, 2007-08-28)

NIAJ AKTIVULOJ ...

ALBERTO DÍAZ CHAPARTEGUI (1892/1984)



Alberto Díaz Chapartegui naskiĝis en Bilbao en la jaro 1892 kaj komencis lerni Esperanton jam en la jaro 1907, t.e., nur 15-jara, estante lia instruisto Teodoro Elizondo, la unua Prezidanto de la Grupo de Bilbao. Pri la kialo de lia scivolemo pri la Internacia Lingvo, li mem diris: "Mi komencis lerni Esperanton, kaj entuziasme daŭrigis tiun lernadon, ĉar konstatis ke ĝi estas ege utila. Ofte, oni aŭdas ke Esperanto taŭgas por nenio, sed mi pensas ke ĝi ne taŭgas por tiuj, kiuj ĝin ne konas".

Li laboris kun alia elstara pioniro de Esperanto en Bilbao, Víctor Olegario de Allende, en la departamento pri "vojoj, kanaloj kaj havenoj" de la bizkaja provinca registaro. En tiu laboro, Eduardo Larrouy, kiu lernis Esperanton de li, en la jaro 1932, memoras ke Alberto Díaz invitis lin kaj lian amikon Saturnino Montero viziti la minejojn de Gallarta kaj E-Grupon ekzistantan en Sestao.

Li loĝis dum multaj jaroj eksterlande, precipe en Nederlando kaj Britio; ĉi-tie li loĝis en Londono kaj Southampton, kie li fine mortis la 22-an de oktobro 1984, ĉe lia filo, Amador Díaz, kiu estis, tiutempe, Prezidanto de Brita E-Asocio. Amador Díaz estis unu el la tiel nomitaj "infanoj de la milito": infanoj senditaj eksterlanden de la vaska registaro por protekti ilin antaŭ la eniro en Bilbaon de la armeo de Franco en la jaro 1937; kurioze, la organizanto de tiuj vojaĝoj estis alia esperantisto, Juan Gracia, ministro de tiu vaska registaro.

Tre brila parolanto de Esperanto ("mi parolas ĝin samnivele ol la hispanan kaj eĉ ofte pli facile estas por mi pensi unue en Esperanto kaj poste traduki en la hispanan", li diris), dum pluraj lernojaroj Alberto Díaz gvidis kursojn en la Grupo de Bilbao. Samtempe, li faris multenombrajn prelegojn, speciale pri abelbredado, temo pri kiu li estis vera specialisto.

Kutima ĉeestanto de E-kongresoj, naciaj kaj internaciaj, li ankaŭ prezidis la Grupon de Bilbao dum tre malfacila historia momento, ĉar estis nomumita la 1-an de oktobro 1932 kaj okupis la postenon, post reelekto, ĝis kiam komencis la hispana intercivitana milito; sekve, estis la lasta Prezidanto antaŭ la malpermeso de la E-movado en nia urbo (kaj preskaŭ en la tuta Hispanio).

Informoj ĉerpitaj el:

- *Intervjuo en la ĵurnalo "Hierro". Bilbao, 19/04/1972.*
- *Boletín de HEF. Nov.-Dic. 1984.*